3-a Jaro. N-o 115 APERAS SEMAJNE 9. Decembro 1926



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktanto: E. LANTY
14, Avenue de Corbéra, Paris-XII

Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, Rue Boyer, Paris-XX

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig O 27

Sennacieca edukado de la infanaro

La baza celo de l' tutmonda proletara movado estas krei novan socion, kiu disrompos ĉiujn barojn inter la popoloj, forviŝos ĉiujn naciajn diferencojn kaj kreos novan mondkulturon.

SAT prenis sur sin la grandan rolon esti pioniro en la batalo por la senmalhelpa irado de la tutmonda kulturo. Do la SAT-anaro devas starigi antaŭ si klare la taskon alceli: Edukadon de l' tutmonda infanaro en la sennacieca idearo, edukadon de kleraj kaj neŝanceliĝantaj batalantoj por la sennacieca tutmonda kulturo.

Ĉi tasko pro sia graveco postulas de ĉiuj SAT-anoj esti aktivaj partoprenantoj en edukado de proletaj infanoj ĝenerale. Ekstarante proksime al sia najbara lernejo, sendepende de sia profesio, ĉiu SAT-ano devas plifortigi la penetron de sennaciecaj ideoj en instruistajn kaj infanajn rondojn, helpi la malaperon de naciecaj sentoj, de malamo al alinaciulo. Ĉiu loka SAT-organizo devas fortikiĝi, akiri aŭtoritatecon per sia serioza laboro kaj preni sur sin la taskon influi partiajn, profesiajn kaj sociajn organizojn, por ke ili rekomendu al la lernejoj esti atentaj al la disvastiĝanta idearo de l' sennaciismo.

La plej grava ilo por plenumi la sennaciecan klerigadon estas la mondlingvo. La naciaj lingvoj ĉiam restos unuigiloj nur de parto da homoj. Diversaj nacilingvaj tradiciaĵoj plienradikigas la naciajn kutimojn, morojn kaj ne permesas direkti la penson for de la naciismo.

Tial, sentante la neceson de internacia lingvo, la naciistoj agitas por la disvastigo de kelkaj naciaj lingvoj, asertante, ke nur en tio kuŝas la solvo de la internacia lingva problemo.

Por ili estas klare, ke studante alian nacian lingvon, oni la naciecon bonege konservas. La studanto konatiĝas kun aliaj naciecaj kutimoj, moroj kaj sentoj kaj kontraŭstarigas ilin al la siaj, per tio la lastajn nur plifortigante. Ĉu konscie, ĉu nekonscie, ĉiuj defendantoj de tiu ĉi internaciiĝo bonege akcelas la plifortiĝon de la naciismo.

Ĉi eraron faras eĉ Sovetio, malgraŭ sia tendenco forviŝi internaciajn barojn kaj diferencojn, unuigi tutmonde la proletaran klason.

Eĉ plej eminentaj ideologoj estas konvinkitaj, ke la estonta mondlingvo estos « natura » rezultaĵo de kunfluiĝo de naciaj lingvoj, ke artefarita lingvo estas absurdaĵo. Do ili ankaŭ zorgas pri la pliviglîĝo de la studado de fremdaj naciaj lingvoj.

La SAT-anaro devas batali kontraŭ ĉi erara opinio kaj ĉiel pruvi, ke nur sennacieca, artefarita lingvo povas plimalmultigi la naciismajn tradiciojn kaj kunligi homojn de diversaj mondpartoj laŭ iliaj profesiaj kaj sciencaj interesoj, sed tute sendepende de ilia nacieco kaj ŝtato.

La mondlingvo tre bone kreos tutmondan literaturon, starigos bazon por la sennacieca kulturo, kaj tiel kreskigos nur tuthomarajn tradiciojn kaj sentojn.

Al la fakto, ke la t. n. « fremdaj » lingvoj estas nepra lernobjekto en lerneja programo, ni, esperantistoj, ordinare rilatas tro tolereme, indiferente. Ni ne devas fari « cedeman politikon ». Se ni konvinkiĝis, ke la « fremdaj » lingvoj nur tro ŝarĝas la infanaron, ne donante al ĝi senteblan utilon (nur unu « utilo » sentiĝas — la naciismo plifortiĝas) ni do ĉesu esti cedemuloj. Ni batalu kontraŭ la vana perdado de tempo en niaj lernejoj por senutila parkerumado de unuaj paragrafoj de fremdlingva lernolibro...

Ĉiujn fortojn ni dediĉu al la pliampleksigado de la SAT-literaturo kaj lernolibraro por ke la lernado de naciaj lingvoj fariĝu pli kaj pli senutila por ĉiuj.

SEVNIK DAN.

La spiritaj produktoj de l' apartaj nacioj fariĝas komuna propraĵo. La nacia unuflankeco kaj limigiteco fariĝas pli kaj pli neebla, kaj el la multaj naciaj kaj lokaj literaturoj formiĝas mondliteraturo.

K. MARX.

La socialdemokrata movado en Aŭstrio

Antaŭ ne longe eldonis la aŭstria socialdemokrata partio libron, en kiu ĝi prezentas la pasintjarajn politikajn luktojn kaj agadojn, precipe la laboron de la unuopaj partiorganizoj. Oni diras, prave, ke Aŭstrio estas la metropolo de la socialdemokratio. Ne ekzistas ja en la mondo alia politika partio, kiu, kompare kun la nombro de la loĝantaro, povus tiel grandan sukceson montri kiel la supre nomita. Amaso da faktoj respegulas klare ĝian laboron.

La ĉi-jara partiraporto parolas jam pri la tria jaro, kiu estis plena je ekonomiaj krizoj kaj koincidas kun la periodo de la terura senlaboreco. Kaj tamen de la jaro 1923 ĝis hodiaŭ kreskis la nombro de l' partianoj de 514.000 ĝis 592.000, kaj ĉiutage daŭras kreski. Tiu fakto jam atestas la grandan progreson de la laborista movado. La socialdemokrata partio kalkulas 15 % el la aŭstria loĝantaro. Sed se ni rigardas la ĉefurbon, Wien, ni vidas, ke el du miliona loĝantaro 324.525 personoj estas organizitaj en la partio. Do tio signifas, ke ĉiu sesa homo estas socialdemokrato. Sur la tuta teritorio aŭstria, la plenkreskintaj viroj je 22, 12 %, kaj en Wien je 38 % estas socialistoj! Eĉ en la preskaŭ nure agrikultura Burgenland el la plenkreskinta loĝantaro 10 % estas organizitaj. Nur en kelkaj partoj de la lando ne povas grandan sukceson montri la partio, kie havas la kristana partio la superecon. En Wien mem kreskis la nombro de la membroj je 23.000 gepartianoj, el kiuj 100.641 estas virinoj.



LA AMALIEN-BANEJO

Tio montras, ke la virino ankaŭ ekkomprenis le necesecon de la solidareco. Malgraŭ tiu granda progreso restas ankoraŭ ebleco por pliprosperigo de la movado interne de la laborista klaso, ĉar de la fake organizitaj laboristoj ĝis nun nur 78 % estas organizitaj.

Krom la agitado per presajoj, kio estas unu ĉefa faktoro de la partia varbado, ni ankaŭ devas la duan atenti : tio estas amaskunvenoj, prelegoj, paroladoj kaj kursoj.

La partio havas ses ĉiutagajn gazetojn, kies eldonkvanto estas kune 137.000 ekzempleroj. Krom tio 13 semajnaj gazetoj kaj multaj monataj jurnaloj varbas por la partio. La plej disvastigita monata jurnalo estas la en 315.000 ekzempleroj aperanta *Sozialdemokrat*. La gazeto de la virinoj aperas en 165.000 ekzempleroj, la gazeto de la luloĝantoj 150.000. Plue la gazeto de la infanamikoj en 90.000 ekzempleroj, la gazeto de la respublika ŝirmligo (Republikanischer Schutzbund) en 45.000, la gazeto de la gejunularo en 30.000 da ekzempleroj. Tiu de la malgranda terkulturistoj aperas en 10.000 da ekzempleroj. Krom tio havas la partio 26 diversajn revuojn, kiuj servas la kulturan kaj sportan movadojn. La suma eldonkvanto estas 940.000. La partio en la jaro de ĉi-tiu raporto disdonis senpage 4 broŝuretojn en 1.155.000 ekzempleroj. Krome eldonis la partio 25 diversajn librojn en la pasinta jaro.

La proletan klerigadon kompletigas la diversaj kursoj. Estis 134 kursoj, krom tiuj instruaj cikloj, kiuj okupis 756 vesperojn. En la diversaj distriktoj estis 3.889 unuopaj paroladoj faritaj, kies nombro kompare al la antaŭaj jaroj triobliĝis. La nombro de la pruntepren-itaj libroj el la partiaj libraroj de 578.000 ĝis 740.000 altiĝis.

La partio havas ankaŭ porartan organizon (Kunststelle), kie la laboristoj povas aĉeti por la diversaj teatroj malmultekostajn biletojn. Lastatempe oni organizis proletajn teatrojn kaj scenejojn, kie la laboristoj prezentas revoluciajn teatraĵojn kun granda sukceso.

La socialista komunumo de Wien konstruas 25.000 loĝejojn, kiuj estas jam preskaŭ finkonstruitaj. Ili estas plej moderne kaj oportune instalitaj. Ĝia granda merito estas ankaŭ la dum la internacia sportfesto en Wien inaŭgurita « Amalien-banejo », la plej granda banejo sur la kontinento.

Al tiu skiza raporto ne necesas ion aldoni, el ĝi ni rimarkas, ke la laborista movado aŭstria sur ĉi tiu irata vojo estas fruktodona kaj esperiga.

CURT EDER (*6889*).

PROFITDONA CIRKONSTANCARO
EN LA
MEZGERMANIA BRUNKARBINDUSTRIO

La produktadkvanto de brunkarbo en la Mezgermania minejregiono plialtiĝis de 7.886.405 da tunoj dum septembro ĝis 8.515.898 da tunoj dum oktobro. La briketproduktado atingis 2.152.767 da tunoj kontraŭ 2.043.069 da tunoj dum la antaŭa monato septembro. Tio estas altiĝo ĉe la brunkarbo 8 % kaj ĉe la briketoj 5,3 %. La en- kaj ekster-landa karbkomerco same montras plialtiĝantan tendencon. Laŭ sindikata raporto necesis dungoj en la briketindustrio.

Dum la sama tempo, kiam konfesas la industriistoj mem la bonan situacion, la laboristoj ricevis salajrplialtigon de nur 3,5 % kaj estas devigataj labori en nehumanaj kondiĉoj 10-12 horojn potage.

Trad. el « Klassenkampf » (Klasbatalo) 7046.

La "jarcento de la infano"

Prizorgo de la nederlandaj laboristinfanoj

Nuntempe estas multe skribate kaj parolate pri la « infano ». Okazis gravaj pedagogiaj kongresoj, en kiuj estis multe parolate pri la « animo » de la infano. Sed la burĝaj edukistoj, kiujn nia epoko tiom multe produktas, tute ne atentas la laboristinfanon kaj trankvile permesas, ke frua mizero kaj zorgoj misformu la infananimon.

Unu el la krimoj farataj kontraŭ la laboristinfanoj, estas la permeso, ke ili partoprenu la hejmindustrion. Granda parto de la hejmindustrio estas farata de la junaj, ankoraŭ lernejon irantaj infanoj. Ekzistas multaj specoj de hejmindustrio. En Holando ekzistas inter aliaj la tiel nomata cepo (1) purigado, kiu somere okazas, dum la libertempo de la lernejon vizitantaj infanoj. La libertempon, kiu devus estis por la infanoj la tempo de ĝuado kaj sanigado, la infanoj travivas apud sakoj da cepoj. Tiel okazas en vilaĝoj kaj urboj, kie la cepo-purigado estas profesio. La infanoj fariĝas okulmalsanaj kaj nervemaj pro ĉi abomena laboro.

Alia speco de la hejmindustrio estas la senŝeligado de salikokoj (2), ankaŭ tiu ĉi laboro estas farata de infanoj. Ĉiujare estas pagataj 25.000 guldenoj kiel salajro, el tiu sumo perlaboras la infanoj 15.000 guldenojn, do tri kvinonojn. La salikokosenŝeligado okazas plej ofte antaŭ kaj inter la lernejaj horoj. Estas kompreneble, ke la infanoj laboregas por pretigi siajn partojn de la laboro, ĉar nur tiel ili povas akiri kelkajn liberajn minutojn por la ludo.

Kiom malmulte da ĝojo tiuj infanoj havas. Anstataŭ iri en la freŝa aero, ili ĉiam devas silente sidi apud la amaso da salikokoj en per sufoka aero plenigitaj domaĉoj. Nenia kontrolo okazas pri la infanlaboro. Pro la mizera stato de la laboristfamilio, la gepatroj devas sklavigi siajn proprajn infanojn. La laborinspekto kelkfoje klopodis ŝanĝi ĉi cirkonstancojn. Sed de ĉiuj flankoj ĝi estis malhelpata. La salikokokomercistoj rifuzas doni informojn pri la senŝeligadlaboro. Kompreneble, la infanoj ja estas malkara laborforto.

La senŝeligado okazas precipe en la urbo Harderwijk apud la suda maro (interna maro en la norda parto de Holando). En ĉi urbo estas tri lernejestroj, sed nur unu volis helpi al la laborinspekto, enketadi pri tiuj infanoj, kiuj devas labori en la hejmindustrio.

Tiel estas la laboristinfano defendata en Holando en la « jarcento de la infano ». Tial ĉiuj paroladoj de burĝaj edukistoj estas nura demagogio. Nur en socio mastrumata de la laboristoj mem, la prizorgado kaj defendado de la infanoj povas efektiviĝi. La burĝoj ne indulgas la infanojn, se ili povas el infanlaboro ĉerpi profitojn. Tial K-doj batalu kontraŭ la kapitalismo, kiu mortigas viajn infanojn.

Trad. el la « Tribune » H. FUCHS.

(1) Cepoj estas speco de bulboj.
(2) Salikokoj, speco de krustuloj.

KOOPERATIVISMO

Skizo pri la historio de la laborist-kooperativoj en Ĉeĥoslovakio

La unuaj provoj organizi la konsumantojn, okazis ĉirkaŭ la 50-a jaro de la pasinta jarcento. En 1847, baldaŭ post la fondo de la unua konsumkooperativo en Rochdale, Anglio, oni fondis en Praha konsumsocieton sub la nomo: Ŝpar-und Viktualenverein (Ŝpar-kaj nutraĵsocieto). En la jaro 1861 estis fondata la unua laborista konsuma societo en Ŝtasov sub la nomo « Viela » (abelo) de la laboristoj en la Strasberger-aj fabrikoj. Sed ĉiuj ĉi-entreprenoj baldaŭ pereis.

Plua provo estis la fondo de laborist-entreprenista societo « Oul » (abelujo) en Praha. Ĝi estis iniciatata de D-ro L. Chleborad. Kelkaj centoj da similaj societoj fondiĝis dum la jaroj 1869-1873. Sed ĉiuj post nelonge pereis kaj kun ili la kooperativa movado ĉesis ekzisti ĝis la jaro 1890. Dum ĉi jaro denove montriĝis komencoj de kooperativa movado. Precipe rimarkinda estas la fondo de laborista presejo en Praha, laborista bakejo, kooperativo de ĉapelistoj, kooperativoj de libristoj kaj fumaĵistoj. La deziro centralizi la kooperativan movadon ekestis en la jaro 1903, kiam aperis leĝo pri deviga revizo de kooperativoj kaj pri aparteno al kooperativaj asocioj. Sub la premo de ĉi leĝo la ekzistantaj laboristaj kooperativoj aniĝis al la Kooperativa Asocio en Vieno. Entute aniĝis al tiu ĉi Asocio 70 ĉeĥaj laboristaj kooperativoj.

Pro la disputoj inter aŭtonomistoj kaj centralizistoj decidis la Kongreso de la soc. dem. partio, okazinta en 1907 en Plzen, ke la ĉeĥaj kooperativoj fondu memstaran Asocion sub la nomo: *Centra Asocio de ĉeĥoslovakaj konsum- produkt- kaj ekonomiaj kooperativoj en Praha.* Tio efektiviĝis en la jaro 1908. Jen statistiko pri la evoluo depost ĉi okazintaĵo:

Jaro	1908	1914	1918	1925
Kooperativoj	86	285	345	1.298
Membroj	14.267	71.504	108.514	470.660
Enspezoj	7.189.309	26.664.770	66.954.454	1.180.152.725 Kĉ.
Membraj akcioj	417.419	1.841.967	3.946.419	79.585.355 »
Ŝparaĵoj de la membroj	352.405	2.075.793	4.290.210	157.669.206 »
Rezerva kapitalo	191.847	775.161	2.035.738	27.943 309 »
Okupitaj personoj	609	808	1.050	10.281

Laŭ ĉi statistiko estas konstatebla la rapida evoluo de la ĉeĥa lab. koop. movado.

Kiaj branĉoj de la kooperativoj ekzistas, montras jena tabelo: Konsumkooperativoj 358; 245 produkt- kaj laborkooperativoj; 212 laboristaj domoj: 242 konstru- kaj loĝejaj kooperativoj; 21 monaj kooperativoj; 220 ekonomi- kaj luprenaj kooperativoj. La Centra Asocio de ĉeĥ. koop. estas organiza, propaganda kaj reviza centro. Krom ĉi tiu fondiĝis en la jaro 1909 « Asocio de konsumkooperativoj por pogranda aĉetado ». Ĝi evoluis jene: enspezoj: 1910 j. - 1.024 926; 1914 j. - 3.238.437; 1918 jaro — 37.206.326 kr. malnovaŭstriaj; 1925 j. — 544.852.947 k.ĉ. La Asocio por pogranda aĉetado posedas krom centra kancelario, proprajn magazenojn en Plzen, Deun, Brno, Prostejov, Mor-Ostrava kaj en Zilina en Slovakio. Ĝi posedas fabrikajn entreprenojn, inter ili 4 grandajn muelejojn, du fabrikojn de fumaĵoj. Nuntempe estas okupataj ĉe ĉi Asocio preskaŭ 900 personoj.

Financa asocia kooperativo estas la « Ĝenerala kooperativbanko en Praha » fondita en la jaro 1920 kun kapitalo de 3,000.000 ĉk., poste ĉi kapitalo estis plialtigata ĝis 5 milionoj. Nuntempe ĉe la « Ĝenerala kooperativbanko » estas mondeponoj de 120.000.000 ĉk. Krom la akcia kapitalo estas rezerva kapitalo de 2 kaj duona miliono da ĉk. Alia koop. Asocio estas la Popolasekurejo « Ĉeĥoslavia », servanta por asekurado de kooperativaj entreprenoj en okazo de brulo kaj ŝtelo. Ĝi akceptas ankaŭ elementan, eĉ porvivan asekuradon. Fondita nur en la jaro 1920, hodiaŭ jam « Ĉeĥoslavia » okupas la sesan lokon inter ĉiuj asekurejoj de Ĉ. S. R.

Centra Asocio, Ĝenerala Kooperativbanko, Centra Asocio por pogranda aĉetado, Popola asekurejo estas la firmaj bazoj, la kerno de la koop. organizoj laboristaj. Centra Asocio eldonadas por siaj membroj ĵurnalon « Druzstevnik » (Kooperatisto), servanta kiel informgazeto por funkciuloj de kooperativo, kaj ĵurnalon « Naŝ Rozvoj » (Nia Evoluo) por koop-anoj. Krom tio ekzistas ok regionaj ĵurnaloj. La eldonkvanto de ĉiuj estas 160.000 ekzempleroj.

Per ĉi malgranda bildo ni povas konstati, ke la lab. kooper. movado penetradis en ĉiujn branĉojn de la ekonomio kaj iĝis tiel bazo por la ekonomiaj, eĉ politikaj luktoj de la laboristaro por la ŝanĝo de la hodiaŭa sociordo. Se ni konsideras, ke la propra kaj deponita havaĵoj de la kooperativoj unuigitaj en la Centra Asocio valoras 1.100.000.000 kĉ., (el tio propra havaĵo de la membroj preskaŭ 500.000.000 kĉ.) ni ekkonas kia signifoplena faktoro iĝis la koop. movado en relative mallonga tempo.

Krom la ĉeĥa Centra Asocio ekzistas ankaŭ germana Centra Asocio, Unio de ĉeĥosl. kooperativoj kaj tri pli malgrandaj Asocioj. Ĉi tiuj asocioj, plejparte konsumaj, nombras proksimume unu milionon da membroj kaj havas kiel enspezon preskaŭ 1 1/2 miliardojn da ĉk.

Tamen ankoraŭ miloj kaj centmiloj da laboristaj familioj staras ekster la koop. movado. Ni laboru, por ilin gajni por nia koop. movado, kiu ne estas celo, sed ilo por ŝanĝi la hodiaŭan sociordon en socialistan.

El « Duch Ĉasu » (Spirito de l' tempo)
trad. J. Sedzimir.

« BARBARAĴOJ EN SOVETSIBERIO »

Ni, kursanoj de la Tvera Kavaleria lernejo, esprimas nian indignon, pri la lerta maniero de la aŭtoro de « Barbaraĵoj en Sovetsiberio », prijuĝi la sovetian vivon laŭ eltranĉaĵoj el tribunalfako (Proceskroniko) de Sovetiaj provincaj gazetoj. Memkompreneble, ke la proceskroniko ne povas respeguli la tutan vivon de Sovetsiberio kaj tia prijuĝmaniero, espereble, ne ricevos la konfidon de la laboristoj.

Ni ne intencas rakonti en ĉi artikolo pri la diversaj sukcesoj de Sovetsiberio, ĉar pri tio oni povus skribi libregon. Ni ankaŭ ne intencas nei la priskribitajn aferojn, kiujn kontrolos la siberiaj K-doj. Ni nur volas klarigi la ĝeneralan situacion de Sovetio kaj montri sur kia bazo povas okazi tiaj aferoj.

1) **Malkulturo.** — Oni povas eĉ ne kompari Sovetion tiurilate kun la okcidentaj landoj. La cara registaro dum kelkaj jarcentoj *malkulturigis* intence 140 milionojn de la rusa popolo. Ne estas eble dum kelkaj jaroj forigi la sovaĝecon, malkulturon kaj analfabetecon. Sed la Soveta Registaro tutforte penas tion ĉi fari kaj laŭ klerigplano la analfabeteco estos preskaŭ likvidata en la jaro 1927, malgraŭ eksterordinaraj malfacilaĵoj.

2) **Drinkemo.** — Ĝi estas la rekta sekvo de malkulturo. La rusa laboristo kaj kamparano dum la cara tempo ne povis vivi sen brando. Rusa drinkemo estas fame konata en la tuta monda. Ĉu oni povas per dekretoj neniigi enradikiĝintan, tradicie kaj kutime iĝintan drinkemon? Sovetia Registaro batalas kontraŭ ĝin per lekcioj, raportoj, afiŝoj, per organizado de kultur-klerigaj oficejoj. Sed tamen tio estas jardekojn daŭranta laboro.

Severe punas la registaro sovetoficistojn kiuj partoprenas en drinkado, diboĉado kaj skandalaranĝoj.

3) **Vagisteco.** — Tio estas unu el la sekvoj de malkulturo kaj drinkemo. La ĉi montritaj ekzemploj estas prenitaj el proceskroniko. Laŭ du manieroj batalas Sov. registaro kontraŭ vagisteco: per la urĝa organizado de novaj kluboj, legejoj, bibliotekoj ktp. kaj per severa puno de socidanĝeraj vaguloj. Popola Komisario por Juro ordonis al ĉiuj tribunaloj juĝi severe fivagulojn, severege eĉ ĝis mortpuno.

4) Ankaŭ **superstiĉo** restis al ni kune kun la plej malkultura ortodoksa religio el la malnova socio. Sed tiurilate la afero plej bone statas. La laborista kaj kamparana junularo preskaŭ nenie en USSR. estas superstiĉa aŭ religiema. Cetere, la Soveta registaro ne persekutas la religiojn, sed nur grandskale propagandas kontraŭ la religio.

Kaj ĝenerale dirite, neniam Soveta Registaro kaŝas la difektojn, kontraŭ kiuj ĝi batalas. Male al burĝaj registaroj.

Ni esperas, ke ankaŭ la Munĥena Gazeto represos nian leteron.

En la nomo de la esp. kursanoj de la Tvera Kavaleria lernejo.

(Sekvas 20 subskriboj.)

Nur tiu ne abonas al

« SENNACIECA REVUO »

KIU NE ŜATAS belan literaturon kaj ne interesiĝas pri scienco, pri edukado, pri pedagogio.

KIU NE ŜATAS belan preson kaj belajn ilustraĵojn.

KIU NE SCIAS, ke tiu bela kaj riĉenhava monata gazeto estas abonebla por SAT-membroj nur kontraŭ 2.50 g. m. por tuta jaro.

Falsa demokratio

Litovio estis blanka lando. Sed nun post la lastaj parlamentbalotoj, la nigra klerikala reakcio ruiniĝis. Nova registaro, starigita de la liberaluloj kaj socialdemokratoj, entreprenis restarigon de « vera » demokratio. Ĉu ĝi sukcesis? Jes kaj ne. Forigo de la milita stato, nuligo de la mortpuno, amnestio de politikaj malliberigitoj (ne de ĉiuj), pliampleksigo de la kunven-kaj presrajtoj. Ĉi tiuj komencaj paŝoj de la nova parlamento forigis pezan ŝtonon de sur la popola brusto. La nova ministraro eksoficigis multajn policestrojn, distriktestrojn kaj aliajn, kiuj teruris la popolon. Kelkaj el ili trafis en juĝejon.

Ĉi tiun ŝanĝon eksentis ankaŭ la laboristaro. Reaperis nuligitaj sindikatoj, organiziĝis multe da novaj. Strikondoj rulis tra la tuta lando. La strikantoj postulis: Efektivigon de la okhora labortago, akcepti sindikatojn kiel reprezentantojn de la laboristoj, ne persekuti laboristojn pro aneco al profunuiĝo aŭ fabrikkomitato, pli homecan traktadon de laboristoj flanke de la mastroj, altigon de la salajro, kelkloke, dungi kaj maldungi laboristojn nur interkonsente kun sindikatoj, kelkloke, kolektivan laboristan dungadon, kaj fine laŭleĝan gvidadon de laborlibretoj. (??-Red.) Malgraŭ tiuj elementaj postuloj, kelkaj strikoj estis malgajnitaj. Eĉ la polico en kelkaj lokoj malhelpis la strikojn. Dum striko en la linfabriko « Kabla », en alumetfabrikoj, dum striko de ŝipanoj sur rivero « Nemunas » kaj aliloke, la strikantoj estis batitaj de la polico, arestitaj kaj eĉ enĉenigitaj. Precipe, ĉar la laboristoj ne permesis la fortransportadon de fabrikproduktoj. Krom tio dum la striko de la ŝipanoj, la ŝtata ŝipo « Vilnius » funkciis kiel strikrompantŝipo. Post protestoj de la laboristoj, la kulpaj policanoj estis eksoficigitaj, sed la laboristaro forte opinias, ke la kulpuloj lokiĝas en pli altaj instancoj. Kaj (preskaŭ nekredeble!) en oktobro estis fermitaj 6 sindikatoj en la urbo Panevezys laŭ ordono de distriktestro. Se ni ankoraŭ mencias, ke oni rifuzis registri kelkloke sindikatojn, kies gvidantoj estas elektitaj maldekstruloj, ke oni arestis jam kelkajn antaŭe liberigitajn komunistojn, ke oni malpermesas organizi komunistan kaj similajn maldekstrajn partiojn, tiam vi certe kun ni konsentos, ke en Litovio regas falsa demokratio.

Kaj kion faras la reakcio. Ĝi ne dormas kaj havas sufiĉe liberajn manojn, kelkaj reakciuloj restis eĉ ĉe la regadaparato. La ĉefo de la politika polico Raĉys, forkuris eksterlanden. La ĉefaj kulpuloj de la antaŭa reakcio, la eksministroj, restis liberaj. En la lernejoj la religio restis deviga lernobjekto.

Aperas la faŝismo. Laŭ iniciato de faŝistoj organiziĝas memvoluloj de litova armeo, kies gvidadon penas transpreni la faŝistoj kaj tiel organizi kontraŭdemokratian bandon. En la faŝistaj gazetoj oni krias pri bolŝevikiĝo de la lando, pri danĝero flanke de la sindikatoj, kontraŭ la subskribita packontrakto kun Sovetio kaj oni eĉ parolas pri la neceseco perforte renversi la demokratan registaron. La 21-an de novembro, la faŝista studentaro organizis kunvenegon kaj manifestadon, malgraŭ la malpermeso de la registaro. La manifestantoj eĉ atakis per bastonoj la policistojn...

Unu el Multaj.

La « Fundamento de Esperanto » (1) devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta *kontrolilo*, kiu gardos lin de deflankiĝo de la vojo de unueco.

L.-L. ZAMENHOF.

(1) Mendebla ĉe nia Administrejo.

☆ DISKUTEJO ☆

« Amerikigo » de Eŭropo? (1)

La sekvoj de la granda milito peze premas sur la eŭropajn landojn. Ankoraŭ la vundoj ne estas fermitaj post ok jaroj da « paco »; senmovaj estas multe da produktejoj, senlaboraj la proletoj; agonio ekonomia, ekskuoj politikaj sen fino. La krizo estas daŭra; se ĝi plimildiĝas en unu ŝtato, ĝi ekflamas en alia regiono: fakte ĝi senhalte migradas tra la eŭropaj landoj, ŝanĝante sian furiozejon laŭ valutaj kaj aliaj cirkonstancoj, sed ne forlasante la vastan teritorion, kiu estis iam la naskiĝejo de la kapitalista civilizacio: okcidentan kaj centran Eŭropon. La produktilaro kreskis tro alten por la malgrandigita vendebleco. Merkato mankas: jen pro kio la krizado sin fiksis kiel eterna gasto.

La suferoj pli akriĝas. Necesas trovi eliron el la doloriga situacio, por forigi definitive kaj lastfine la postlasaĵojn de la milito. Du vojoj prezentiĝas, du ekzemploj staras antaŭ niaj okuloj, du landoj, kiuj sukcesis eliri el la milita ĥaoso: *Sovetio* kaj *Usono*.

En Rusio, la proletaro renversis la militnaskan kapitalismon, detruis la ŝtaton de la burĝaro kaj firme konstruis la proletan diktatorecon. Post jaroj de intercivitana kaj de kontraŭeksterlanda militoj, post malsato kaj teroro, post kompleta disfalo de la produktado, venis periodo de paca kaj sukcesplena rekonstruo La proletaro el Sovetio faras la unuajn paŝojn al socialismo. Multego estas jam farita en ekonomia rekonstruo; senkompare ŝanĝiĝis la aspekto de la lando depost kiam mi venis la unuan fojon en Sovetion, antaŭ tri jaroj. Sed se multo estas jam farita, ankoraŭ senfine pli multo estas ankoraŭ farenda. Paŝo post paŝo, la laborularo laboras por realigo de l' socialismo, ofte haltigate, ofte renkontante malhelpaĵojn; sed la antaŭenmarŝado progresas, la antaŭmilita vivnivelo — sufiĉe malalta — de la laboruloj estas fakte atingita (2), dum en Eŭropo, la proletoj ne nur estas ankoraŭ tre malproksime de ĝi, sed tie, kie ili ĝin preskaŭ konservis, kiel en Anglio, eĉ devas sin defendi nun per ĉiuj fortoj kontraŭ malbonigo de siaj ekzistokondiĉoj.

Ĉe la alia flanko de la suferanta Eŭropo staras Usono, la lando de ekonomia florado, de arda aktiveco, de altaj salajroj kaj de socia paco, sub malkaŝa regado de la granda kapitalo.

Al ambaŭ landoj, Sovetio kaj Usono, direktiĝas la serĉantaj rigardoj de la eŭropanoj. Por eliri el la eŭropa ĥaoso, oni devas sekvi unu el la du ekzemploj, elekti ĉu la burĝan solvon, Usono, ĉu la proletan eliron, Sovetio.

Sed la vojo de la proleta revolucio estas penega. Ĝi kondukas tra sango, morto, malsato, doloroj. Por veni al socialismo, oni devas pasi tra enkonduka infero. Tion ŝajnas eviti la usona vojo. En Usono regas — kompare al Eŭropo kaj se ni fermas por momenteto la okulojn antaŭ la bestaj kruelaĵoj kontraŭ negroj kaj antaŭ la mizerega situacio de grandaj amasoj da ne kvalifikitaj laboristoj — kontento kaj feliĉo, la « socia demando » ŝajnas esti solvita sen socialismo, sed ankaŭ sen intercivitana milito, sen klasbatalo. Parto de la eŭropaj laboristoj volas sekvi la sovetian ekzemplon; sed la burĝaro kaj alia parto de la laboristaro en Eŭropo deziras imiti la usonan metodon.

En niaj antaŭaj artikoloj ni jam montris, ke la senkompara prosperado de Usono estas sekvo de senkompare esceptaj cirkonstancoj, ke necesas atendi krizon kaj la pluan evoluon, antaŭ ol juĝi definitive; ni montris, ke fakte la « socia demando » tie tute ne estas solvita, ĉar la klasa kontraŭeco inter kapitalistaro kaj proletaro ne malaperis, sed nur kelktempe malakriĝis. *Nun ni devas ekzameni ĉu la metodoj, kiuj ebligis al Usono tiel brilan, kvankam nedaŭran, prosperadon, estas aplikeblaj en Eŭropo kaj kiaj estus iliaj sekvoj por la proletaro.*

En kio konsistas la usona supereco kompare al Eŭropo? La sinjoroj, kiuj propagandas en Eŭropo la « amerikigon », la novan evangelion de interklasa harmonio, mencias tri ĉefajn punktojn:

1e Teknika perfekteco;

2e Supera ŝtatorganizo (unu grandega ekonomiteritorio sen limdepagoj inter diversaj ŝtatoj de la Unio);

3e Komerca supereco (la fama devizo: « altaj salajroj, malaltaj prezoj! »).

S-ro Ford skribas dikajn librojn por konvinki la malfeliĉajn eŭropanojn; alia usona entreprenisto, S-ro E. Filene, ne nur skribis libron, sed eĉ venis persone al Eŭropo kaj kun dankinda fervoro faris en multaj urboj paroladojn plenegajn je bonaj, sed ne malmultekostaj konsiloj. Apostoloj de la nova kredo troviĝis en Eŭropo mem: S-roj Austin kaj Lloyd en Anglio, S-ro Francis Delaisi en Francio. S-ro Coudenhove Kalerghi donas politikan esprimon al tiu tendenco, batalante por « Tuteŭropo », por la forigo de la limdepagaj baroj, por la kreo de tuteŭropa ŝtatunio.

Sekve, por saniĝi, Europo devas pliperfektigi sian produktan aparaton, plibonigi la organizon de la laboro, anstataŭi manlaboron per maŝinoj, enkonduki la faman « glitĉenon » (3), ŝpari forton, monon kaj tempon, per racia konstruo de la produktejo, sur loko, kiu permesu eviti kiel eble plej troan transporton de krudaĵoj aŭ de finitaj produktaĵoj. Tiel oni sukcesas malaltigi la produktadelspezojn kaj trovi novajn, pli grandajn rondojn da aĉetantoj, dank' al malaltigitaj prezoj.

Jen bona recepto. Sub la premo de la krizo, oni en Germanio jam ĝin aplikis, sub la fama titolo de *raciigo*. Oni organizis la ekonomiadon laŭ pli « raciaj » principoj. Oni fermis fabrikejojn malgrandajn, malnovajn,

---

(1) Vidu la artikolserion « Ĉu Marks eraris? », n-roj 99, 102, 103, 104, 105, 106, 107, 109, 110.

(2) Oni ne forgesu, ke por havi ĝustan bildon de la vivnivelo de sovetia laboristo, necesas konsideri krom la salajro la aliajn servojn, kiujn la salajrulo raiĵtas postuli de la socio kaj kiuj antaŭ la proleta revolucio ne ekzistis, ekzemple senpaga kuracado, ĉiu jara pagata libertempo, favoraj prezoj por teatro ktp.

(3) Fr. « chaîne mouvante »; germ. « laufendes Band »; angl.: « conveyer ».

nesufiĉe potencajn je teknika vidpunkto, por koncentri la produktadon en la plej grandaj, kiuj ebligas produkti la saman kvanton da produktaĵoj per malpli da laboro, dum malpli longa daŭro, per malpliigita energikvanto (elektro, vaporo k. c.) kaj per malgrandigita perdo senutila de krudaĵoj kaj de akcesoraj materialoj. Oni fermis la fabrikejojn malplej bone lokitajn je vidpunkto de altransporto de krudaĵoj aŭ de detransporto de produktaĵoj, koncentrante la produktadon proksime al fontoj de krudaĵo aŭ al minejoj de karbo ktp. por malpliigi la transportelspezojn.

Sed tiu raciigo en unu lando, Germanio, ne sufiĉas; ĉiuj eŭropaj ŝtatoj ĝin bezonas, eĉ pli ol Germanio ĝin bezonis. Sed ankaŭ tia, ĝenerala raciigo en ĉiu eŭropa ŝtato ne estus sufiĉa. La eŭropa ekonomio estas ege komplikita radaro, kun milope interplektitaj rilatoj. La ĉefa, plej efika raciigo estas farenda ne aparte en ĉiu lando, sed en Eŭropo kiel tuto. Fabrikejoj ricevas krudmaterialon tra longega distanco, el malproksimaj fontoj; tre proksime al ili estas minejoj, el kiuj oni povus pli facile ricevi la bezonatan krudaĵon; sed ili ne povas profiti el tiu situacio, ĉar landlimo kun altaj doganbaroj estas inter ili kaj la prosksimega fonto, dum la malproksima minejo troviĝas en ilia propra lando.

Tiel la demando de la teknika supereco de raciigo, nin jam kondukas al la dua punkto, al la ŝtata divido. La doganimpostoj malebligas ne nur efikan raciigon, ili ankaŭ terure plialtigas la prezojn de la varoj, kaj tiel limigas la nombron de la aĉetantoj. Limigante la nombron de la aĉetantoj, ili ne permesas plenan utiligon de la ekzistanta produktilaro kaj tiamaniere ree plialtigas produktadkoston kaj prezon. En Usono, tiaj malhelpaĵoj ne ekzistas. Fabrikejoj povas esti konstruataj laŭbezone apud minvejnoj aŭ nafto-fontoj, kaj neniu doganlimo enŝoviĝas inter la erojn de unu produktanta tuto.

LUCIEN REVO.

(Daŭrigota.)

Ĉu vere oni ne havas monon?

Certe la ekonomia mizero estas terura. Senlaboreco sufokas la forton de la laboristaro. Mankas la ilo por kulturlaboro, oni ne havas monon, por migri en la naturo kaj pasigi la liberajn horojn inter la grandiozeco de la naturo, mankas la mono por estiĝi membro de la naturamikoj kaj tiel kunhelpi al la proleta migradmovado kaj ĝiaj kabanokonstruoj. Tiel estas, ĉu vere estas tiel? Ĉu vere oni ne havas monon por tio?

Sed oni havas monon por diversaj glasetoj da vino aŭ biero, oni havas ĝin por senvaloraj kinoprezentadoj, kies esenco celas efiki sur la proletaron en la senco de la burĝaj moralpredikoj. Kaj ankaŭ estas mono por senvaloraj libretoj kaj por suprajaj, bestigaj « amuzoj ». « Manko de mono » estas ofte nur preteksto de tiuj, kiuj volonte uzas ĉiun elturniĝon, por kovri sian sendisciplinecon, senvolecon.

Laŭ informoj de la T.A. « La Naturamikoj » Gazetarservo (Centro Wien).

Tradukis: ALFRED KLEIN.

La mekanikigo de la laboro

« Karakteriza vidaĵo », skribas en « Niewe Rott. Courant » d-ro Blankenstein, « estas ĉinaj kulioj plenumantaj penan laboron kiel ekz. elfosi kaj transporti teron aŭ sablon.

Tio okazas laŭ jena maniero: Du viroj portas bastonon sur kiu pendas korbeto, uzata por transporti teron. Du aliaj plenigas la korbeton kiam ĝi revenas malplena. La duono el la kvaro laŭvice atendas, ĉu la portistoj aŭ la plenigistoj.

Neniu ankoraŭ pripensis, ke tiu laboro per du korbetoj povus esti farata duoble pli rapide, sen ke tio signifus troan lacigon de la laboristoj. La laboro tiele farata estas nur parodio de laboro.

La kaŭzo de tiu malvigla, senpripensa labormaniero estas, kiel rimarkas d-ro Bl. poste, en la malbona nutrado de la ĉinoj, sekve de ilia malriĉeco.

Kaj nun la alia ekstremo:

« Iumatene mi serĉis laboron. Sur benkoj sidis homoj atendantaj. Kuracisto palpis miajn muskolojn. Kvazaŭ bestkuracisto, kiu ekzamenas la komercvaloron de bestoj apud la enirejo de buĉejo. Mi estis akceptata. Mi nun laboras; oni donis al mi matrikulon, mi estas grupigita en ĉi modernan, Tajlor-sisteman fabrikon. Ĝi similas kazernon, malliberejon, kie la personeco estas forigata. Ĉio estas subdividata en laborservoj, grupoj, laborejoj ktp. Nenio restas krom la uniformo, griza ombro de laborist-maŝinoj, la laboro de la subprematigo estas perfekta. »

Tio ĉi estas komenco de raporto: « Fordismo » verkita de franca laboristo, kiu rakontas per sobraj vortoj pri siaj spertoj en la fabriko de Ford, en Asnières apud Paris, aperinta en « Clarté » (Klareco).

Maljuna laboristo avertas lin pri perfiduloj, ĉiam pretaj aŭskulti kaj denunci lin. En la oficejo ĉio estas enskribita. Denuncado kaj semado de malharmonio inter laboristoj regas.

Kiuj ne estas sufiĉe fortaj por konkuri en la laboro kun la aliaj, tiuj ĵaluzas. Kiuj liveras pli da laboro, tiuj malestimas la malrapidulojn. Ili laboras kiel bestoj. Ili scias ne plu ion alian, krom gajni kelkajn monerojn pli ol najbaro.

Kiu pripensis la efikon de la ĝis fina specialigo kaj mekanikigo de la laboro (la Tajlorismo nur estas provizora fino), tiu ne povas nei, ke terura danĝero, ne antaŭvidata de la Marksismo, minacas la realigon de la socialismo. Ĉu la mekanikigitaj laboristoj de la Tajlor-sistemo ankoraŭ kapablos deziri la novan socion kaj per ĉiuj fortoj batali por ties realigo? Neniu kun certeco povas respondi al tio. Sed la unua, necesa kondiĉo por batali kontraŭ la danĝero estas anonci kaj esplori ĝin, ekkoni ĝian amplekson, ekzameni la ruinojn, kiujn ĝi kaŭzas en la spiritostato de la laborista klaso. Ŝajnas kelkfoje, ke ĉiuj tendencoj en la socialismo timas esplori ĉi regionon: la regionon de la psikologia stato de la proleta klaso. Tio ĉi estas la fundamenta regiono, kiun ni devas koni treege, por rajti paroli pri « scienca taktiko ». Kaj oni pripensu, ke tio, kion ni nomas ĉi tie koncize « regionon », ne estas iu konkretaĵo, sed ĉiam ŝanĝiĝanta, ĉiam moviĝanta fluo. Kelkfoje ŝajnas, ke ni serĉas supraje la kaŭzojn por klarigi la atendemon, la senenergiecon, la senfortecon de la amasoj, por ke ni ne bezonu esplori la ŝanĝiĝon en la spiritostato de la laboristoj. Ŝanĝiĝojn kaŭzatajn unue per la influo de la laboro, de la produktsistemo kaj, plue, de la ĝenerala mekanikigo de la vivo.

La toleremo kaj la stulteco de la amasoj estas la plej gravaj, ĉefaj kaj danĝeraj malhelpaĵoj en la batalo por la socialismo. Kaj, ĉar tiu stulteco kaj senenergieco daŭradis dum la lastaj dek jaroj, malgraŭ tiom da teruraj okazintaĵoj, oni ne povas nei la rilaton inter la spirita stato de la laboristoj kaj la kreskanta mekanikigo kaj specialigo de la laboro.

Esploro pri la spiritostato de la laboristo kiel homo kaj klasbatalanto, laŭ lia laboro, profesio, laŭ la maniero de la plenumado de ĝi, tia esploro nature estas tre malfacilege efektivigebla. Tamen tiaj esploroj estas necesaj por kolekti la materialon, kiu ebligas al ni respondi la demandon pri la rilato inter Tajlorismo kaj klasbatalo.

(Daŭrigota)

Laŭ artikolo de HENRIETTE ROLAND HOLST, *en « Klassenstryd » (Holanda komunista revuo).*

PRI ŜANĜO DE KLIMATO EN EŬROPO KAJ AZIO

Pasinta vintro estis tre malvarma en Francio, Krimeo kaj Sudkaŭkazo dum en Sibirio ĝi estis dufoje pli varma ol ordinare. La varmiĝo en Sibirio okazas sistemece dum la lastaj 5 jaroj kiel mi sciigis jam en « S-ulo ». Vintra temperaturo de Jakutsk altiĝis je 10°.

Meza temperaturo de unuaj 14 tagoj de marto en Irkutsk nunjare egalis — 7,9° dum ordinara temperaturo de l' sama periodo estis — 14,9°. Pro tio ĉiuj riveroj senglaciiĝis unu monaton pli frue ol ordinare, Bajkal glaciiĝis nur la unuan de februaro kaj senglaciiĝis la 26-an de marto, glacio de Bajkal dikis nur ĉirkaŭ du dekonmetrojn. Samaj ŝanĝoj okazas rilate al temperaturo de somero. En Sibirio ĝi malaltiĝas kaj moderiĝas, en Eŭropo ĝi altiĝas. Laŭ lastaj sciigoj en urbo Ĉito (en orienta Sibirio) kaj en irkutska gubernio dum ĉi somero ekfloris duan fojon frangolo (*), kiu floras nur en printempo. Ĝin kaŭzas plilongiĝo de somerperiodo je unu monato. La sekvoj de l' klimatŝanĝo devas esti tre grandaj por tuta homaro ĉar la ŝanĝoj plibonigas vivkondiĉojn en tuta norda duono de Azio, kiu de nun fariĝas facile koloniigebla. Alia ne malpli granda sekvo de l' ŝanĝo estos, ke Norda oceano ĉe bordo de Eŭrazio fariĝas pli kaj pli ŝipirebla kaj riverŝipoj el tie per grandegaj sibiriaj riveroj povas penetri eĉ en Mongolion (Enisej-Angaro-Bajkal-Selengo). Same devas plifaciliĝi plej oportuna aervojo inter Eŭropo kaj Norda Ameriko tra Norda Oceano.

La kaŭzo de l' klimatŝanĝo estas la plialtiĝo de temperaturo kaj de forto en varmaj eltropikaj oceanfluoj, kiuj portas varman akvon (20°—25° C.) el Florida golfo al Nordpolusa oceano preter Eŭrazio. La fluego portas milfoje pli multe da akvo ol la plej granda rivero de l' mondo Amazono.

M. KRJUKOV.

(*) Sibiria arbeto kun blankaj bonodoraj floroj kaj nigraj adstringaj fruktetoj kernohavaj.

TRA ESPERANTIO

Ĉe la laboruloj.

EL LA REDAKTEJO

Kuŝas sur nia skribomeblo 42 vortigitaj opinioj pri « S-ulo ». El tiuj malmultnombraj respondoj al nia enketo sole 5 venis el grupoj. Ĉiuj ceteraj diras nur personan opinion.

Kion konkludi el tio? Ĉu la granda plimulto da legantoj indiferentas pri sia gazeto? Aŭ ĉu ilia silento signifas aprobon pri la nuna aranĝo? Se jesa estas la respondo al ĉi lasta demando, tiaokaze ni demandu: kial do tiom malrapide progresas la varbado de novaj abonoj? Kial ekzistas tiom granda diferenco inter la nombro de abonantoj kaj tiu de laboristaj esperantistoj?

Sed se la malemo konigi sian opinion pri « S-ulo » signifas indiferentecon, inertecon flanke de la Legantaro, ĉe tia konstato oni emas sin demandi : ĉu valoras? Ĉu ne estus pli bone forlasi la sendankan, penegan redaktan laboron? Ĉu ne estus pli saĝe elspezi sian liberan tempon, energion kaj eĉ sanon por alia entrepreno?

Tiaj pensoj kelkfoje sin trudis al ni. Necesas, ke ŝanĝiĝu la nuna stato de nia gazeta afero. Aliel ni ja alvenos al firma konvinko, ke... ne valoras...

Estas tamen vero, ke el la ĝis nun alvenintaj respondoj, la granda plimulto da ili estas aprobaj kaj eĉ kelkaj tre laŭdaj : Nia dekstra orelo *jā aŭdis multe pli da sonoj ol nia* maldekstra. *Ni parolus malsincere se ni dirus, ke tio lasas nin indiferenta. Sed same sincere ni povas diri, ke ĉiuj malaprobajn kritikojn ni bonakceptis kaj prikonsideris. El tiuj malaproboj estas kelkaj, kiujn ni konsideras ĝustaj. Bedaŭrinde ne estas ĉiam eble kontentigi pravajn postulojn. Ne dependas de ni, se el multaj landoj oni ne sendas materialon. Antaŭ du monatoj, ni eĉ dediĉis tutan tagon por skribi instigajn leterojn aŭ kartojn (almenaŭ 20) al diversaj K-doj el multaj landoj, ke ili bonvolu kunlabori. Ni skizis eĉ planon de raportoj. Al niaj instigoj respondis nur du K-doj. Ni diras* du! *Kion fari? — Nur paciencîĝi dum kelka tempo antaŭ ol finfine konvinkiĝi, ke... ne valoras.*

Dume ni ankoraŭ konigu pri la sonoj kiujn aŭdis nia maldekstra orelo :

« Antaŭ ĉio ni devas esprimi nian riproĉon pri la foresto aŭ forestigo de la rubrikoj « Inter ni » kaj « Ekster ni ». La Radio-paĝo estas forigenda aŭ almenaŭ malampleksigenda... »

Tion skribis hungaria K-do. La batinda Iuelie *kaj malserioza* Eŭtrapel *bonvolu do havigi al ni materialon por ke ni ne plu ricevu tiajn riproĉojn. Sed, sed?*

« Ĉiama plendado pri faŝistaj kruelaĵoj kaj krimoj ne devas plenigi la paĝojn de nia gazeto. Tio malbonhumorigas kaj oni perdas la intereson por tia legaĵo. Necesas kontraste publikigi novaĵojn, kiuj montras prosperan disvolviĝon sur alia terangulo... (Aŭstria K-do).

« Koncerne la rubrikon « Tra Esperantio »... oni renkontas kronikaĵojn, kiuj « parolas nek al la saĝo, nek al la koro »... sed senforman amason da nenion parolantaj proklamoj. Pli da faktoj, ciferoj!... » (Sovetia K-do).

El Britio oni riproĉas, ke ne estas sufiĉe da bildoj. Londonano postulas, ke oni forigu la Radio-paĝon, kiu « estas granda malŝparo de valora spaco... »

« Ne plaĉas al mi la artikoloj, kiuj venas el Sovetio, diras Frankfurta K-do, ili estas tro oficialaj kaj ŝajnas esti verkataj laŭ mendo de la registaro. Nia gazeto devas respeguli la klasbatalon. Nu, en Sovetio estas 17 diversaj kategorioj de salajroj, do ekzistas tie klasoj kaj sekve klasbatalo. Sed pri ĝi oni silentas sur la paĝoj de « S-ulo ». La Radio-paĝo estas por mi senvalora... »

« La gazeto devas esti firme bazata sur fundamento de l' scienca socialismo de Marx-Engels, dialektika materialismo. — La « Letero al S-ro Coolidge » (N° 102) entenas pasivecon kaj fatalismon. — « Nia Moralo » (sama n°) ne havas ion komunan kun Marksismo, ĝi estas filistraĵo. Mi malaprobas jenajn artikolojn : (N° 102) « Sekreto de Siberia Tajga » (Strange, nia dekstra orelo multe aŭdis pri tiu artikolo). « Restaĵo de l' arktika ekspedicio de 1845 ». — (N° 104) « Sekvoj de varmiĝo en Siberio ». « Ĉu virinoj estros la mondon? », bagatelaĵo filistre argumentita. « Prilingvaj tezoj » estas superfluaĵo. — (N° 98-99) « Scienco-Tekniko », la tuta fako de l' n° ne estas atentinda. — (N° 103) « Praktika kultura tasko de SAT », superfluaĵo. — La « Sprita Angulo » tute ne estas sprita kaj la anekdotoj odoras tre filistre. — Same iome rilatas al « Lernanto »...

Tiel skribis K-do el Sormovo, N. Novgorod, Sovetio.

★

NI PRIZORGU EDUKLABORON INTER SAT-ANOJ

Jam en kelkaj n-roj de « S-ulo » ni trovas la fakon « Oni mallaŭdas ». Sendube, tio estas rimedo por influi kulpulon, sed la apero de tia fako, ankaŭ atentigas nin pri nia interna laboro.

Ĉu niaj K-doj, en lokoj kie ekz. loĝas pli ol dek SAT-anoj, penis organizi eduklaboron inter si? Ĉu ni povas certe diri, ke ĉiu membro de SAT konas kaj komprenas nian Statuton? Sed kiu klopodas klarigi ĝin? Kiu organizas internan laboron. Kiu, kaj kiarimede, prizorgas instrui niajn novulojn pri niaj taskoj, celoj, idearo kaj priparoli aktualajn demandojn de SAT-laboro?

Tre maloftaj estas laŭregulaj kunvenoj de lokaj SAT-rondoj kaj oni kontentas viziti kunvenojn de naciaj esp. organizoj, kiuj evitas entagordigi SAT-demandojn. Se kunvenas SAT-rondo estas mafacile trovi en la tagordo demandojn de momente necesa, konkreta SAT-laboro. Oni ŝatas priparoli ĝeneralajn demandojn, kiuj ne ĉiam taŭgas por eduklaboro. Kaj ĝis nun tiun laboron plenumas « S-ulo » nur en tre malgranda grado.

Nia laŭstatuta peranto, plejofte trookupata, ne povas sole gvidi tiun eduklaboron. Ni devas pliviglígi nian « internan laboron », tiel ni ankaŭ influos nian « eksteran » peresperantan laboron.

Plejparte ĝis nun la propaganda laboro por SAT okazas dise, per soluloj, neorganizite kaj la sukcesoj de tia propagando estas malmultvaloraj. Ni devas por pliviglígi la SAT-laboron : 1) Formi SAT-rondojn laŭurbajn; 2) Firmigi la kunligon de apartaj kaj izolaj SAT-anoj kun la perantoj; 3) Periode okazigi kunvenojn de la SAT-rondo por priparoli organizajn demandojn de SAT-laboro (ĝis nun tio nur okazis antaŭ la kongresoj, kio sendube ne estas normala); 4) Tagordo de tiuj kunvenoj enhavu, krom ĝeneralaj demandoj de nia movado, interesajn temojn por la novuloj ekz. : teknikaj demandoj de internacia korespondado, faka laboro en SAT ktp.; krome temojn pri aktuala laboro de SAT aŭ de SAT-rondo ekz. : organizo de SAT-propagando en la urbo (1), raporto de la rajtigito por varbado de abonantoj, raportoj de diversaj komisioj rajtigitaj plenumi ian konkretan SAT-laboron ktp. Sendube per tio ni povas firmigi la kunagecon inter niaj anoj kaj klarigi multajn demandojn de nia praktiko, kio rezultigus sukcesan laboron de SAT.

259.

(1) Ni supozas, ke K-do 259 aludas propagandon en la urbaj esp. grupoj por tie varbi al SAT. Almenaŭ ne povas esti dubo, ke domaĝus, se la SAT-anoj tute sin apartigus de la lokaj esperantaj organizoj. — *Red.*

★

DUA INTERNACIA OLIMPIADO en Ĉekoslovakio

Ĉeĥoslovakia gimnastika laborista Ligo (D.T.J.), kiu nun prezentas grandan movadon (entenas 100.000 anojn), preparas sin por grandiozaj gimnastikaj festoj : Olimpiado, en julio 1927. La ĉefurbo Praha estas elektita. Ĉe tiu okazo estas videblaj, entuziasmo kaj idealismo ĉe malriĉaj laboristoj pri kiuj ĉeĥaj etburĝoj parolaĉas, ke ili ne estas oferemaj. La tuta entrepreno estas malfacila, kaj postulas sufiĉe grandan elspezon, kiu estos pagata plejparte de anoj mem kaj parte de l' Ŝtato. La Ligo eldonis dekkronajn

asignojn, propagandajn glumarkojn kaj vidaĵkartojn por kolekti la bezonatan monon.

Sur la placo, kiu mezuras 160×200 metrojn gimnastikos 25.000 anoj (viroj, virinoj, junuloj kaj gelernantoj). Komence de ĉi tiu vintro jam festoj komencas per konkursoj de vintraj sportoj. Ankaŭ ekster Ĉeĥoslovakio oni multe interesiĝas pri tiu Olimpiado, kaj pro tio laboristaj esperantistoj proponis siajn servojn al prepara komitato, kiu favore ilin akceptis. Ĉi tie estas okazo bonega, por propagandi esperanton kaj la SAT-ideon. Esperanto estas akceptita de la Komitato en fakon por fremduloj kun sama ŝatateco kiel la naciaj lingvoj.

Por esperantistoj kiuj partoprenos la Olimpiadon, estos ĉio bone preparita, se venos sufiĉe da aliĝoj. Tial estas bezone, ke ĉiu K-do vizitonta la Olimpiadon anoncu sin al nia esperanta fako. Estos aranĝitaj renkontejoj kaj apartaj noktejoj.

En manifestacia konduko de gastoj, kiu marŝos tra la urbo, ni volas organizi en ĝi grupon el sennaciuloj kun standardoj.

K-doj! Sukceso kuŝas en viaj manoj, montru al ĉeĥoslovakaj laboristoj, kiel funkcias la SAT aparato. Kiu deziras ricevi detalajn sciigojn, aŭ artikolojn pri la Olimpiado por naciaj gazetoj, tiu skribu laŭ jena adreso:

« Svaz dělnických tělocvičnych jednot esperanta fako, Popola domo, Hybernska strato N-o 7, Praha II, Ĉekoslovakio. »

Eman Hloupy (*4370*).



LABORISTARO KAJ MUZIKO

Volonte ni aŭskultas muzikantan K-don, kiu forpelas per sia instrumento la zorgon kaj ĉagrenon de si mem kaj de ni. La muziko estas internacia. La lingvo de la muzikisto estas la sama en ĉiuj landoj. Ĉie oni komprenas la lingvon de la muziko kaj volonte oni lasas sin forporti, entuziasmiĝi de ĝiaj sonoj.

Malfacilega estas niaj luktado, laboro por nova socio. Ofte multaj K-doj ekmalesperas el la vicoj de la batalanta proletaro. Sed, same ofte ili trovas novan forton, novan esperon per la muziko. Ĉiu de ni ja scias, kia forto ekzistas en kantado kaj muziko uzataj en niaj rondoj. Oni ĉerpas novan penson kaj pli grandan kuraĝon por la batalo. Ĉu vi mem ankaŭ ne travivis tiajn momentojn, kiam ĉe manifestado, ĉe laborista kunveno, la kantado de niaj belaj revoluciaj batalkantoj plirapidigis la batadon de la koroj, rektigis la de la laboro klinigitajn korpojn, igis pli firme la amasojn ekpaŝi kaj spiteme rigardi la rigardaĉantajn burĝojn. Tremigas ilin la sonoj de niaj minacantaj kantoj venkemaj, kantataj de multaj proletbatalantoj. Nia subtenilo en malfacilaj momentoj de la klasa batalo estas la kanto.

Ni esp. laboristoj, estante parto de tutmonda proleta batalantaro, same ŝatas la kantojn kaj muzikon. Kaj multe pli ol la aliaj ni havas la eblecon esprimi niajn laboristajn sentojn per la kantoj. Ne fremdaj estas por ni la batalaj kantoj de alilingvaj batalantoj kaj subprematoj. Nia lingvo disvastigis ilin sur tuta mondo. Unuece ni kantas dum niaj kongresoj la belajn kantojn de la plej diversaj lingvoregionoj. Sed pli ofte eksonu la majestaj tonoj de niaj laboristaj kantoj en niaj vicoj. Ni ne forgesu ĉi instigilon, kuraĝigilon en la batalo por nia movado.

Proletaria Kantaro

180-paĝa kun 74 kantoj nuntempaj kaj historiaj, esperantigitaj el 22 lingvoj. Kun muziknotoj, zorge presita kaj aranĝita. Formato: 12 × 17,5 cm.

Prezo: **2,50** g. mk.

Ĉe Adm. de SAT.

KRONIKO

Aŭstrio.

Salzburg. — Okazas kurso kun ok gelernantoj. La Labor. Esp. Grupo kiu havas 27 membrojn (kiom da SAT-anoj?) post longjara penado atingis la malfermon de ĉiusemajna esp-o rubriko en la socialdemokrata tagĵurnalo « Salzburger Wacht ». Aperas artikoloj pri esp-o, k. SAT, informoj kaj kelkfoje ankaŭ tradukaĵoj el « S-ulo ». La grupo kunlaboras kun la loka liberpensula movado, kies organo « Freie Weltanschaŭung » propagandas por esp-o kaj represas el « S-ulo » kaj « Liberpensulo ».

Belgio.

Bruxelles. — Ĉi tie funkcias 5 kursoj kun sume 45 lernantoj. La perleteran kurson partoprenas 16 franclingvanoj k. 3 flandrlingvanoj.

Fleron. — Ĉe socialista sportasocio estas starigita kurso kun 25 gepartoprenantoj.

Verviers. — Okazas 2 kursoj kun 40 lernantoj.

Estonio.

Tallin. — En du malliberejoj okazas lecionoj pri diversaj lernobjektoj al la malliberuloj. Interalie estas ankaŭ instruata esp-o al tri grupoj, kiujn partoprenas 25 pers., instruas H. Dresen.

4227.

Francio.

Orléans. — Parolis K-do 518 en Laborborso ĉe la grupo de Kom. Junularo pri « esp-o je servo de mondproletaro », la 19. okt. Ĉeestis kelkaj lab. gvidantoj. Komenciĝis kurso kun 20 gelernantoj. La grupo dez. korespondi kun similaj kom. grupoj alilandaj.

Germanio.

Breslaŭ. — Ekfunkciis 4 kursoj en okt. kun 130 Gek-doj. En dec. estos malfermataj novaj kursoj. La sindikataj k. partiaj gvidantoj subtenas nin. La du ĉi tie aperantaj lab. gazetoj (socialdemokrata k. komunista) publikigas niajn alvokojn senpage. La laborista domo ĉiusemajne disponigas por senlaborula kurso ĉambron. Bonvole sendu p.k.il. por stimuli la gekursanojn al K-do Edwin Haschke. Kronprinzenstrasse 11. Breslaŭ XIII (Germ.). La ricevo estos al ĉiuj sendintoj danke atestataj per il. p. k.

Hispanio.

Palafrugell. — La 31. okt. dum ĉeesto de Barcelonaj K-doj estis fondita SAT-rondeto kun ok K-doj kaj inaŭgurata SAT-flago belega, la unua en Hispanio. Ni esperas, ke en venonta Jarlibro jam estos trovebla pli granda nombro da SAT-anoj. *7389.*

Litovio.

Darbenai. — Serĉante laboron mi trovis en ĉi urbeto tute neatendite SAT-anojn. Dank' al la klopodoj de K-do Vitoldo (7047) ĉi tie funkcias esp. kursoj, kiujn partoprenas litovoj, poloj, hebreoj, rusoj kaj du latvoj. La lecionoj okazas nur dimanĉe, ĉar K-do Vitoldo devas piedmarŝi 12 kilom. por atingi la kursejon... Krom nur prilingvaj lecionoj K-do 7074 ĉiufoje paroladas aŭ gvidas diskuton pri diversaj temoj. F. H.

Kaŭnas. — Estas organizita ĉi tie granda ĥoro esp.-ista. La lokaj ĵurnaloj enpresis artikolojn pri esp-o k. SAT.

Ŝiauliai. — Estas gvidata ĝenerala esp-o kurso kun 40 partoprenantoj de K-do Sakaschansky. Kurso por gimnazianoj kun 50 partoprenantoj estas gvidata de K-doj Médišauskas k. Jocas.

Veliuona. — Ĉe la ĉi tiea ĵurnalaro estas organizata esp. kurso.

Sovetio.

Dolinskaja. — SEU-filio kune kun SAT-ĉelo partoprenis je la tago de la 9-a datreveno de Oktobra revolucio la manifestadon kun iliaj propraj standardoj. Dum la mitingo sur la placo okazis publika parolado esperanta. *5875.*

Ivanovo-Voznesensk. — Laboras esp-rondoj ĉe lokaj fabrikoj, lernejoj kaj oficejoj. En nov. organiziĝis k. komencis funkcii esp-rondeto ĉe Red. de loka lab. ĵurnalo « Rabočij Kraj ». Esp-on lernas 12 personoj, gvidas K-do A. Kiselev. *3409.*

Tver. — « Tverskaja Pravda », loka ĉiutaga ĵurnalo, ricevis okaze de la 9-a datreveno de la Oktobra Revolucio esperantajn salutojn el la plej diversaj landoj. La presiĝo de ĉi salutoj ege impresis la laboristkamparanan amason en Tver. Du leteroj eĉ estis fotografitaj k. fotoj kun la tradukoj de la teksto publikigitaj. En « T. P. » regule aperas anguleto de « Int. lab. kor. » En la antaŭoktobra numero enpresiĝis salutletero de japana SAT-ano, alveturinta Tveron. La Oktobran feston la Tvera organizo de SEU solenis per kunveno k. prezentado de « Du esperantismoj », agitopereto de K-do Varankin. La japana SAT-ano, K-do Tava, kiu salutis la solenan kunvenon estis brue aplaŭdita.

La 5. nov. la Agitkolegio de Gubernia Kompartia Komitato aŭskultis raporton de Gub. komitato de SEU k. decidis: a) disendi cirkuleron al ĉiuj partiaj organizoj pri la subteno de la esp. movado; b) aprobi la starigon de « Labintkor. » fako en « Tv. Pravda » k. de « Komisio por interligo » ĉe Urba Komjunula Komitato k. proponi la samajn komisiojn organizi ĉe la Gubernia Intersindikata Konsilantaro k. ĉe Fabrikdistrikta Komitato; c) proponi al Intersindikata Konsilantaro organizi senpagajn kursojn.

En Tvera Kavaleria Lernejo organiziĝis Fako por internacia interligo. Ĝi komencis grandskalan esp. korespondadon kun diverspartiaj, profesiaj, junulaj ktp. organizoj en Eŭropo kaj Azio. Dum unu monato estas ricevitaj 24 leteroj.

Komenciĝis instruado de esp-o, kiel nedevigа objekto, en preskaŭ ĉiuj 2-a ŝtupaj lernejoj de Tver. Lernas la lingvon pli ol 300 infanoj.

1116.



Ĉe la neŭtraluloj.

Ni ricevis jenan leteron:

Al S-ro Lanty, redaktanto de « Sennaciulo ».

Estimata sinjoro,

« Via raportinto pri la *Esperantista Kongreso de universitatanoj en Lyon* (N° 113, p. 8) skribas: « S-ro Kar (kiu estas S-ro Kar? Mia nomo estas Cart; oni montru, se oni volas, la elparolon inter krampoj, sed ne kripligu la *veran* nomon) parolis nacieme, kiel decas al bona franco ». Bona franco mi

certe estas kaj la raportinto estas prava, se lia diro signifas, ke mi ne parolis « sennacieme », sed min li ne komprenis se tio signifas, ke mi ne parolis « internacieme » ĉu en mia respondo al K-do Marsel Ru (?), ĉu en mia antaŭa parolado. Kion mi pensis post la ekkrio de K-dino Gerin, li ne scias. Tion mi volonte konfesos. Mi *ĝojis*, ke ŝi fariĝis esperantistino malgraŭ la cirkulero de S-ro Bérard, sed estus preferinta, ke ŝi ne bezonis por tio ian persekuton. La utilo de persekuto por ia ajn propagando ŝajnas al mi tre duba kaj ankaŭ certe al multaj SAT-anoj. Aliparte al Diablo mi neniam sendis iun ajn — rilatojn kun la « Infera » Satano mi ne havas — kaj sendi al li esperantistinon eĉ sataninon tute ne venis, tute ne povis veni en mian penson ! »

Via, TH. CART.

Nia raportinto certe ne havis ofendan intencon. Cetere, laŭ la ĝustigo de S-ro Cart mem, estas fakto, ke li ne parolis *sennacieme*. Kaj ni volonte konfesas, ke internaciemo kaj naciemo tre bone akordiĝas. Ĝuste pro tio ni estas sennacianoj.

Red.

★

« LITERATURA MONDO » MORTIS

Kvankam la eldonantoj de ĉi revuo ne favoris nin per interŝanĝaj ekzempleroj, ni tamen havis la okazon teni en manoj kelkajn n-rojn. Tiu gazeto estis certe belaspekta, riĉe ilustrita, bone redaktata, unuvorte vivinda. Tamen ĝi mortis... pro manko de sufiĉa nombro da abonantoj. Tre pripensiga fakto.

LINGVAJ DEMANDOJ

Ĉar mi estas instruisto, mi ne povas nomi « pentrostabloj » la tripiedajn « chevalet »ojn (tute similaj al la tripiedaj stabloj de la pentristoj) sur kiu estas surapogitaj miaj nigraj tabuloj. Ankaŭ tute ne estas « pentrostablo » la malalta kvarpieda « chevalet » sur kiun mi kuŝigas laŭlonge miajn brulŝtipojn por ilin segi — aŭ la tre eta dupieda « chevalet », kiu subportas la violonkordojn. *3489.*

— Ĉar la stablo, kiu surportas vian nigran tabulon, estas tute simila al la stablo de la pentristoj, nomu ĝin simple STABLO same, kiel oni povas ankaŭ fari parolante pri pentrostablo, se la kunteksto aŭ la faktaj cirkonstancoj sufiĉe precizigas la sencon de la ĝenerala vorto STABLO. Ekz., en la sekvanta frazo (R. Spero. Urbo de belega sensencaĵo, p. 27) la aŭtoro uzas la simplan vorton STABLO ĉar, dank' al la kunteksto, ĉiuj komprenas, ke temas pri PENTROSTABLO : « La ĝibulo jam estis tie pentranta, sin premanta al sia stablo. »

La komuna lingvo ne kapablas *nek bezonas* posedi precizan apartan nomon por ĉiu teknika ilo de ĉiu metio ; ĝi ne bezonas aparte nomi la du aliajn SUBPORTILOJN aŭ SUBAPOGILOJN aŭ SUBLEVILOJN, pri kiuj vi aludas ; sed ĝi kapablos en la praktiko komprenigi la aferon, uzante ĉirkaŭfrazon aŭ plurvortan klarigon, ekz. KORDO-SUBPORTILO, SUBPORTILO POR SEGI BRULŜTIPOJN, aŭ simple PORSEGA PORTILO, ŜTIPOSUBPORTILO. Nur la teknikistoj povas *konvencie* elekti precizajn unusencajn fakajn vortojn por aparte nomi precizajn fakajn ilojn. Ĉu vi, ekzemple, konas, en via nacia hejma lingvo, la ĝustan apartan propran nomon de la du iloj, kiujn vi citas ?

FAKULO.

★

NIA POŜTO

7010. — Lernolibroj en naciaj lingvoj ne ekzistas ĉe SAT.

★

MEMORNOTO

Represis el « Sennaciulo ». — *Der Freie Arbeiter*, Berlin, 20-XI-26 : « La Pekinaj ĝinrikŝoj » (108). — *Krasnoarmejskaja Pravda*, Smolensk, 22-X : « Malordo inter holandaj soldatoj » (106) kaj 7-XI-26 : « Senkaŝaj impresoj pri Sovetio » (106). — *Rabočij Putj*, Blankrusio, 3-XI-26 : « Senkaŝaj impresoj » (106). — *Junij Pioner*, Smolensk, n-ro 35 : « Junpioniroj estu pretaj » (104).

Enhavas notojn pri SAT. — *Sächsische Arbeiterzeitung*, Leipzig, 5, 16, 18-XI-26. — *Tverskaja Pravda*, Tver, de 31-VII ĝis 27-VII 15 artikoletojn pri SAT. — *Bulletin d'Information de l' I. T. F.*, Amsterdam, okt.-nov. n-ro -26.

Enhavas tradukaĵojn el esperantistaj leteroj. — *Krasnoarmejskaja Pravda*, Smolensk, de 16-X ĝis 9-XI, 26 tradukaĵojn. — *Rabočij Putj*, Blankrusio, en sama tempo 20 tradukaĵojn. — *Smolenskaja Derevnaja*, Sovetio, 22-X-26. — *Krasnoarmejskaja Zvezda*, Novo-Sibirsk, 30-X-26. — *Iskra Iljiĉa*, Gomel, 14-X-26. — *Bolŝeviĉenjata*, Kiev, 10-X-26. — *Za Miri Trud*, Rostov, 13-VII, 11-XI-26. — *La Dépêche de l'Aude*, Francio, 1-VII-26. — *Tverskaj Pravda*, Tver, de 20-VIII ĝis 18-XI, 25 tradukaĵojn. — *Sächsische Arbeiterzeitung*, Leipzig, 23-XI-26. — *Robitnik*, Poltava, 28-X-26. — *Raboĉaja Gazeta*, Moskva, 3-XI-26. — *Der Ŝtern*, Ĥarkov, 9-XI-26.

Enhavas priesperantajn artikolojn. — *Le Travailleur*, Francio, 6-XI-26. — *Molodij Bilŝovik*, Kiev, 14-XI-26. — *Junij Leninec*, Ĥarkov, 23-X-26. — *Le Cri du Peuple*, Lyon, 13-XI-26. — *Za Mir i Trud*, Rostov, 2-VI, 1-VIII, 19-VIII-26. — *Krasnaja Zvezda*, Moskvo, 16-X, 9-XI-26. — *Raboĉij Putj*, Smolensk, dum okt. k. nov. 5 artikolojn. — *Laborist-kamparana korespondanto*, ĉeforgano de sovetiaj « labkoroj » en n-roj 19, 20. — *Tverskaja Pravda*, Tver, 2, 12, 17, 18-IX, 10-X, 2-XI-26. — *Bulletin d'Information de l'I. T. F.* Amsterdam, nov.-26. — *Molodij Bilŝovik*, Tver, 18 k. 21-XI-26 : 3-a k. 4-a leciono de l' esp-o kurso.

La plej popularaj ! La plej malkaraj !

Por germanlingvanoj!

Esperantaj lernolibroj kaj vortaroj de D-ro Emil Pfeffer aperintaj en la Viena Tagblatt - Biblioteko :

Esperanto in 10 Unterrichts-Stunden. Kun elparolo, gramatiko, ekzercoj, poemoj, traduk-ŝlosilo ktp. Por meminstruo kaj kursoj. 6-a ĝis 10-a milo.

Erstes Esperanto-Lesebuch für Anfänger und Kurse. Elektita prozo kaj poezio kun laŭvorta germana interlinia traduko kiel ankaŭ lingvaj kaj literaturaj klarigoj. — Serĉado en vortaroj superflua!

Wörterbuch Esperanto-Deutsch. Enhavas ĉiujn de la Akademio akceptitajn vortradikojn kiel ankaŭ la plej komun-uzajn fakesprimojn. (Ĵus aperis.)

Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Ĉirkaŭ 200 paĝoj da teksto kun pli ol 20,000 germanaj vortoj kaj 30,000 tradukoj. Kvarobla numero jus aperis!

Prezo por 48-paĝa volumeto 25 pfen., 2 kĉ., 40 groŝoj.

Postulu senpagan prospekton kun prov-paĝoj de

Tagblatt-Bibliothek, Wien I, Fleischmarkt 5.

Sub signo de Gaja Muzo !

★

Verdkata Testamento

DE

RAYMOND SCHWARTZ

Afr. 2.— mk. g.

ĉe la Administracio de SAT.

Ĉu jam troviĝas en via esperanta libraro la unika verko, kiu ebligas komprenon de la homaj problemoj kaj historio, la *unua proleta atlaso*? Se ne, havigu al vi ĉi belan instruan verkon.

MALGRANDA TERBIBLIO

originale verkita en esperanto de Prof. D-ro FERD. SZERENYI.

ENHAVO : 11 grandaj landkartoj kaj multaj skemoj kun klariga kunteksto sur bonega papero.

Formato : 26 × 36 cm. Prezo : **1,80** g. m.

Havebla ĉe la Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig-O-27

KORESPONDADON pri laborista vivo, vivkondiĉoj ktp., kun ĉiuj landoj deziras havi Esperanta Laborista Rondeto. Gek-doj skribu laŭ jena adreso :
Zavkom Telefonnogo Zavoda imeni V. J. Lenina, Esperanto-Kruĵok, Miza, Niĵnij-Novgorod, Sovet-Unio. Respondo estas garantiata.

Le Gérant : L. GLODEAU. ★ Esperanto-Presejo J. SOLSONA, 9, Rue Hallé, Paris-14e — Telefono : Gobelins 62-71